Memprezento de Christer Oscar Kiselman

Mi estis elektita al la Akademio de Esperanto en 1989 sekve de invito fare de ties tiama prezidanto, André Albault, kaj estis reelektita en 1998. Mi membras en la sekcioj pri la ĝenerala vortaro, pri gramatiko, kaj pri prononco. Mi nun estas kandidato por tria naŭjara periodo, 2007—2016.

Pri pli ampleksa prezento vidu mian *Mallongan biografian noticon kun listo de verkoj en esperanto kaj pri lingvoj*. Pri plena biografia notico kaj pri plena listo de verkoj vidu `http://www.math.uu.se/~kiselman` (*cveo.pdf*, 4 paĝoj, respektive *bibliography.pdf*, 8 paĝoj).

La ĝenerala sekretario petis min indiki miajn planojn por la venonta periodo kaze de reelekto. Ili estas tre simplaj – kaj apenaŭ dependas de eventuala membreco.

• Unue mi volas daŭrigi la redaktadon de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies*, kies kvara kajero nun estas preparata. Ĝia redakta komitato estas formale sendependa de AdE, sed havas plurajn membrojn kiuj estas akademianoj.

• Due mi havas delonge planon ellabori kune kun H. S. Holdgrün en Göttingen matematikan vortaron surbaze de nia laboro por la *Nova Plena Ilustrita Vortaro*, pri kiu ni laboris dum preskaŭ dek jaroj, 1991—2001.

• Trie mi volas verki pliajn matematikajn tekstojn pri matematiko, eventuale kune kun H. S. Holdgrün, similajn al la ĵus aperinta Enkonduko al distribucioj, kiu fidele sekvas la de PIV rekomenditan lingvouzon.

Komisioj rilate al esperanto aŭ la sveda lingvo

• Vicprezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esperantista 1986—1993. • Ĝenerala sekretario de la Internacia Scienca Akademio Comenius 1986 — nuno. • Komisiita de Sennacieca Asocio Tutmonda revizii kune kun H. S. Holdgrün la matematikajn terminojn en *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* 1991—2001. • Komisiita de Sennacieca Asocio Tutmonda revizii kune kun Ingemar Kaj la statistikajn terminojn en *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto* 1995—1996. • Vicprezidanto de la Akademio de Esperanto 1998—2004. • Gvidanto de nacia projekto pri sveda matematika terminologio 2001 — nuno. • Membro de la Lingva grupo de la Fakultato pri teknologio kaj natursciencoj, Upsala universitato, 2003-06-10—2006-04-30. • Sekretario de la Komisiono pri la Internacia kongresa universitato (Vilno, Florenco, Jokohamo) 2005 [—2007].

Organizado de konferencoj (nur rilate al esperanto)

• Unu el la organizantoj de la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio, Upsalo 1993-05-29—31. • Ĉefa organizanto kaj Vicprezidanto de la Organiza komitato de la *Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio, ISLPL 2001*, Zagrebo, 2001-07-28—30. • Organizanto kaj prezidanto de la Programa komitato de la *Simpozio pri interkultura komuniko*, Gotenburgo, 2003-08-02—03.

Verkoj pri matematiko en esperanto

• La kultura signifo de la matematiko, 1989, 1990, 1994 [Tradukita en la ĉinan, la japanan kaj la islandan]. • La teoremo de Siu por abstraktaj nombroj de Lelong, 1992. • La geometrio de la komputila ekrano, 2003. Enkonduko al distribucioj, 2007.

Verkoj pri lingvistiko en esperanto aŭ en la sveda

• La problemo de duarangaj derivaĵoj en Esperanto, 1988. • Vortkreaj procezoj de Esperanto, 1991. • Nomoj de matematikaj operacioj en Esperanto, 1991. • Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? [Studo pri la influo de la jida ĉe esperanto], 1992. • Studo pri la vorto *dateno*, 1992. • Primitiveco de kelkaj adverboj, 1993. • Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto, 1995. • Vad är ett naturligt tal? Ett exempel på matematisk språkvård [Kio estas natura nombro? Ekzemplo de matematika lingvoplanado], 1995. • La sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj, 2001. • Kreado de matematikaj terminoj, 2001. • Svenskt fackspråk inom teknik, matematik och naturvetenskap [Sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj], 2001.

Nepublikigita teksto pri Zamenhof

• Hilelismo kaj homaranismo, 12 p. [1993].

Lekciaj notoj kaj esplorraportoj en esperanto aŭ pri lingvoj

• Matematika terminaro Esperanto-angla-franca-sveda, 1985. • Konvekseco en kompleksa analitiko unu-dimensia, 1986. • Konveksaj aroj kaj funkcioj, 1991. • Matematikens två språk [La du lingvoj de la matematiko], 2005.

Aliaj publikigitaj verkoj en esperanto aŭ pri lingvoj

Dum la jaroj 1981 ĝis 1986 mi verkis 8 artikolojn en la sveda pri esperanto. Postaj verkoj estas: • *Recenzo pri:* Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto de O. Reiersøl, 1986. • *Recenzo pri:* Enkonduko al problemsolva originala KJ-metodo de Kawakita Jiro, 1992. • Ankoraŭ pri komputiloj kaj supersignoj, 1992. • *Recenzo pri:* Konciza Gramatiko de Volapuko de A. Cherpillod, 1995. • *Recenzo pri:* Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj. Ĉu mi lernu esperanton?; Einführung in die Theorie sprachlicher Spiele. Soll ich Esperanto lernen? de R. Selten kaj J. Pool, 1996. • *Recenzo pri:* Historio de la universala lingvo Volapuko de J. Schmidt, tradukita de P. Combot, 1996. • Libereco de kreado estu homa rajto [Raporto pri Unesko-konferenco], 1998. • Eklipso de la suno. 1999. • Akademio en Berlino, 1999. • Akademio sin prezentas ankaŭ prelege, 1999. • Suna eklipso 1999 08 11, 1999. • La fondo de Akademio Comenius. Eseoj memore al Ivo Lapenna, 2001. • Simpozio pri lingva planado kaj leksikologio en Zagrebo, 2001. • Fundamentaj vortoj en la Akademia Vortaro, 2002. • Normer finns för datum [Ekzistas normoj kiel skribi datojn], 2002. • Datering och logisk ordning [Datumado kaj logika ordo], 2002. • Kulturens kraft [La forto de la kulturo], 2005. • (Christer Kiselman, Sven Halldin, Ulf Danielsson, Karin Carlson, Amalia Mattsson kaj Martin Rutberg) "Svenska språket dör ut på landets universitet" ["La sveda lingvo mortas en la universitatoj de Svedio", 2005. • (Amalia Mattsson, Christer Kiselman, Karin Carlson, Martin Rutberg, Sven Halldin kaj Ulf Danielsson) Utbildningens internationalisering och demokratin [La internaciigo de la edukado kaj la demokratio], 2005.

Redaktado rilate al esperanto aŭ la sveda

• Redaktoro (kune kun P. Neergaard) de *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius*, vol. 1 (Pekino), 1992. • Redaktoro de *Matematiko Translimen*, No. 7, 1992. • Eksperto kaj verkinto por *Nationalencyklopedin*, la Sveda nacia Enciklopedio, 1987—1996. • Eksperto pri la matematikaj terminoj en franca-sveda vortaro: *Fransk-svensk ordbok*, XIV + 1007 p., 1995. • Redaktoro de *Esperantologio / Esperanto Studies*, Kajeroj 1—3, 1999—2005. • Redaktoro (kune kun G. Mattos) de *Lingva planado kaj leksikologio. Kontribuaĵoj al internacia simpozio. Zagrebo 2001 07 28—30*, 2001. • Redaktoro de *Simpozio pri interkultura komunikado*, 2003-08-02—03, 2005.

Prelegoj en esperanto aŭ pri lingvoj en la sveda

Dum la jaroj 1988—2005 mi faris 14 prelegojn en esperanto en 10 landoj. Mi faris 8 prelegojn en la sveda pri esperanto aŭ pri la sveda dum la jaroj 1991—2006. Mi faris unu prelegon en la angla pri esperanto en Krakovo (2006). Mi faris unu radiointervjuon en esperanto kaj unu en la franca en Pekino (2004).

Partopreno en kongresoj kaj konferencoj (nur rilate al esperanto)

Mi partoprenis en 18 universalaj kongresoj, nome en tiu de 1980 (nur unu tagon) kaj plene en ĉiuj de 1987—2006 krom tri, tiuj en 1988, 1990 kaj 1993. Krome mi partoprenis en la sekvaj kongresoj kaj renkontiĝoj. • *2-a Internacia Akademia Konferenco Pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, IAKSTE*, Pekino 1988-08-10—16. • 11-a landa kongreso de Islanda Esperanto-Asocio, Reykjavík, 1993-08-14—15. • *Kolokvo pri la stato kaj estonteco de la lingvo Esperanto*, Prago, 1994-07-07—14. • *Vintraj tagoj*, Helsinko, 1990-02-07—11. • *Kultura Esperanto-festivalo*, Västerås, 1990-05-26. • Nacia kongreso de la Sveda Esperanto-Federacio, Upsalo, 1993-05-29—31. • Esperanto-renkontiĝoj en Sajgono kaj Hanojo 1994. • *Vintraj tagoj*, Helsinko, 1996-02-24. • *Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj*, Prago, 1996-07-22—23. • *Intergovernmental Conference on Cultural Policies for Development*, "The Power of Culture", organizita de Unesko, Stokholmo 1998-03-30—04-02. • Renkontiĝo en la Esperanto-klubo de Jokohamo 1999-10-02. • Strategia semajnfino: Pri lingvo-politiko kaj ĉirkaŭ ĝi, Roterdamo, 1999-11-27—28. • *Kultura Esperanto-Festivalo*, Helsinko, 2000-07-17—23. • *Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio*, Zagrebo, 2001-07-28—30. • *Simpozio pri interkultura komuniko*, Gotenburgo 2003-08-02—03. • Konferenco organizita de la Nordia ministra konsilantaro en Oslo, 2004-06-07—08. • *Du- kaj plurlingvaj universitatoj*, Helsinko, 2005-09-01—03.